# EKO 2023

Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

**EKO 2023 / 31 Majo 29, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Pezo: Word: 177 KB, Ĝia sveltigita PDF: 309 KB. Sume: 466 KB**

## <Landa Parad’> pretigitaj por 2023

Tiu projekto temas pri bonigo kaj ampleksigo de la parto de la siatempa Jarlibro de UEA. Ĝi prezentas raporton pri la sekvaj regionoj:

AFRIKO 22p. PDF 1,4 MB (ĉiuj PDF sveltigitaj).
AMERIKO 18p. PDF 917 KB
AZIO 28p. PDF 1.5 MB
EŬROPO. 39p PDF 3.17 MB
MONA. 11p. PDF 767 KB
PACIFIKO. 8p. PDF 593 KB.

SMG petis, ke UEA aldonu tiujn dokumentojn al sia retejo, sed povos daŭri la la negocoj pri tio. Se iu deziras iun aŭ iujn el tiuj raportoj, bv. peti tion de SMG.

## Studsemajno en Nederlando kun kurso

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Studosemajnfino en Nederlando
Gvidantonomo: Arjen-Sjoerd de Vries
Tipo: Nova movada kurso
Lolo: Bornerbroek, Nederlando (provinco Overajssel, apud Almelo).
Aldoninto: ineke

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27533

## Donacu al Fondaĵo Canuto de UEA. Kreskigu nian mondon!

Raporto pri la stato de membrigoj FC aperos fine de majo por la tradiciaj donacantoj al la Fondaĵo

# Greziljono preparas sian someron

**La franca kulturcentro plej aktivas tra la someraj ferioj. Ĝuu la oferton!**

***KURSOJ***

- Andrea Bertrand (Francijo) : Kurso por komencantoj kaj komencintoj (A1-A2)
- Szilva Szabolcs (Pollando) « El akveroj fariĝas riveroj » (B1-B2)
- Radojica Petrović (Serbio) « Per perloj al astroj » (B2-C1)
- Duncan Charters (Usono) « Perspektivoj pri Esperanto » (C1-C2)
- Ekzamensesio de ILEI *staĝofine* en 3 niveloj : 1a (A2), 2a (B2), 3a (C1)

***AKTIVAĴOJ***

- Turismaj vizitoj laŭ komuna interesiĝo, ekz. kasteloj de Azay-le-Rideau, Langeais.
- Jannick Huet : Promenado en la parko por malkovri la lokan flaŭron kaj faŭnon
  Bert Schumann : Libroservo surloke, vidi la liston.

  - LA SEMAJNO RESUME
    - Ĝenerala disvolviĝo de restado --- Menuoj
    - Prezoj kaj aliĝilo --- Aliĝintoj kaj iliaj loĝlokoj
    - Foto de tiu ĉi staĝo --- Fotoalbumoj, filmetoj de pasintaj staĝoj --- Grupfotoj
    - Opinioj de partoprenintoj de tiu staĝo kaj de pasintaj staĝoj

**INFORMOJ: gresillon.org/maratona?lang=eo:**

**ALIĜILO: gresillon.org/aliĝo**

# ILEI planas por pluiro en Francio

Dum la franca kongreso de Esperanto en Liono okazis neformala kunsido kun deko da partoprenantoj. Dum tiu kunveno ĉiuj povis prezenti ideojn kaj proponojn por enkondukigi Esperanton en lernejojn. Mankas volontuloj por agadi en lernejoj, interalie mankas profesiaj lernejaj instruistoj. Kiel varbi profesiajn lernejajn instruistojn al Esperanto? Mi invitas ĉiujn, kiu volas helpi, skribu al mi ĉe: didier.janot@gmail.com. Nia asocio estas kaj landa sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj faka asocio de Espéranto-France. En 2022, ILEI-Francio/GEE havis 34 membrojn (33 per Espéranto-France kaj unu dumvivan), Por 2023, jam estas 46 membroj kaj eblas aliĝi ĝis septembro 2023. Kiel varbi novulojn, junajn instruistojn?

Didier Janot

# De la Nacia Estraro de Kuba Esperanto-Asocio

En Guantánamo oni Instruas Esperanton per radioprogramo. La elstara aktivulo de la provinca grupo en Guantánamo, d-ro. Roberto Cutiño Palau gvidas la kurson en Radio Guantánamo. Temas pri nova atingo danke al la laboro de la esperanta teamo en la plej orienta provinco de Kubo, kies rilato kun la radiostacio jam de jaroj solidiĝas. Kadre de sekcio en kultura radio-revuo kaj nome de la provinca grupo, eblos lerni ne nur la lingvon sed ankaŭ pri la esperanta kulturo kaj ĝia graveco por elstarigi la naciajn kulturojn.

**Granma invitas al Krisolaj Esperanto-Tagoj ĉi-maje**

La provinca filio de la orienta provinco Granma invitas ĉiujn partopreni sian eventon en majo en la feriejo “La Sierrita”. Temas pri esperanta aranĝo kiu

enplektigos ankaŭ la lokan komunumon. La feriejo havas interesajn historiajn faktojn kiujn oni povas koni vizitante ĝin.

### La elstara kuba aktorino kaj esperantistino Georgina Almanza 90 jariĝis

Aprile la elstara kuba aktorino, multjara esperantistino kaj honora membro de Kuba Esperanto–Asocio, Georgina Almanza, 90 jariĝis en Havano. Reprezentanto de la kuba esperantistaro, ankaŭ nome de la provinca filio Urbo Havano kaj de la Nacia Estraro de KEA, akompanis ŝin en tiu ĉi speciala tago, por kune rememori gravajn momentojn de ŝia vivo en nia movado kun siaj brilaj poemdeklamoj.
Inter ŝiaj multaj gravaj atingoj en nia movado, troviĝas la akiro de diplomo pri elstara arta agado, kiun ŝi ricevis en la jaro 2010 de Universala Esperanto – Asocio, pro ŝia kontribuo al la esperantista kulturo.

### Orlando Raola prelegis en KEA pri Artefarita Intelekto

Kun granda plezuro la kuba esperantistaro akceptis la kuban esperantiston loĝantan en Usono, Orlando Raola, kiu vizitis la Nacian Sidejon de Kuba Esperanto – Asocio la pasintan 29an de aprilo, por revidi geamikojn, kundividi kun la loka esperantistaro kaj  prelegi pri Artefarita Intelekto, ege aktuala temo ankaŭ por Esperantujo.
Kadre de sia mallonga vojaĝo al la insulo pro personaj kialoj, Raola dediĉis tempon ankaŭ al esperantumado kaj riĉigis nian sabatan monatan aranĝon per sia prezento.

### UEA alvokas por novaj projektoj pere de “Ni semas”

“Ni semas” estas programo de Universala Esperanto-Asocio (UEA), lanĉita en 2015 kiel subvenciprogramo por malgrandaj Esperanto-projektoj. En 2022 ĝia regularo estis reviziita kaj nun la programo funkcias sub kunordigo de la Afrika Komisiono de UEA (AK) kun fokuso al Esperanto-projektoj en Afriko. Kadre de la programo, la AK de UEA anoncas konkurson pri subvenciotaj projektoj en la kontinento.

## Unika konvento elektis mondan gvidorganon

Unu el la plej impresaj travivaĵoj de mia vivo«, priskribas sian sperton Ciprian JAUCA, rumandevena esperantisto, kiu delonge vivas en Kanado. Tie li membras en la Nacia Spirita Asembleo, la landa gvidorgano de la bahaa komunumo. La anoj de ĉiuj tiuj institucioj, ekde 1963 ĉiun kvinan jaron kunvenas en la Bahaa Mondcentro en Ĥajfo, Israelo, por elekti la internacian gvidorganon. »Neniam antaŭe mi ĉeestis tiel multetnan, buntan, diversecan, sed tamen samtempe tiel harmonian, amopenetritan, spiritoplenan kunvenon de homoj el vere ĉiuj anguloj de la mondo. Tiuj tagoj vere anticipis estontecon de pace unuigita homaro«.

JAUCA ĵus revenis de la kunveno okazinta en majo. Ĉirkaŭ 1250 membroj de 176 landoj povis kiel li persone veni al Ĥajfo. La ceteraj pli ol 300 per interreta voĉdono partoprenis en la elekto, kiu havis centprocentan partoprenon. La delegitoj kolektiĝis jam kvin tagojn pli frue por unue sin prepari pilgrime vizitante la sanktejojn de la bahaa mondcentro en Ĥajfo kaj Akko.

Mesaĝo de la Universala Domo de Justeco al la bahaanoj kaj publikigita dum la konvento retrorigardas al la atingoj de la bahaa komunumo tra la pasinta jaro kaj prilumas la defiojn, kiujn ĝi frontas je siaj klopodoj kontribui al persona kaj socia transformado. La mesaĝo ankaŭ parolas pri la monda situacio kiel »profunde malcerta tempoperiodo«, pri tio ke estas »vasta agnosko ke la hodiaŭaj sociaj strukturoj estas netaŭgaj por fronti la bezonojn de la homaro dum siaj nunaj naskokonvulsioj«, ke ĉie la homoj serĉas »unuigan vizion« kaj ja tre multaj dividas la

idealojn de »unueco, egaleco kaj justeco«. kaj »Iuj kun bonaj intencoj por la homaro eble unue altiriĝas al la bahaa komunumo kiel rifuĝejo, kiel ŝirmejo en mondo paralizita. Tamen, krom ŝirmejo ili trovos gefratajn animojn laborantajn kune por novkonstrui la mondon«.

La bahaaj internaciaj konventoj multrilate unikas. Ne troviĝas komparebla kunveno de reprezentantoj de ĉiuj popoloj de la monde demokrate elektitaj, kiuj sen ajna arogo de potenco en plena harmonio kaj preĝa sinteno elektas sian internacian estraron. La unikecon de la proceduro priskribas 7-minuta filmo »Summons to Service« (alvoko al servado; spektebla ĉe: https://vimeo.com/823250880/ebcbb3b82b?share=copy), kiu estis prezentita dum la konvento ĉe akcepto aranĝita de la bahaa mondcentro por internaciaj, landaj kaj lokaj registaraj autoritatuloj, eminentuloj kaj religiaj reprezentantoj kun kiuj ĝi rilatas kaj kunlaboras, inter ili la urbestrino de Ĥajfo.

Pri tiu ĉi 13-a Internacia Konvento ĉiutage raportis, per komunikaĵoj ilustritaj per etaj filmoj kaj/aŭ multaj fotoj, la monda bahaa novaĵservo BWNS (vidu: https://news.bahai.org/). Ene de la konvento estis unuafoje prezentita nova filmo »An Expansive Prospect« (vasta perspektivo) kiu prilumas la strebadojn en kvar regionoj de la mondo, kie individuaj homoj, komunumoj kaj institucioj klopodas transformi la vivkondiĉojn laŭ la supre menciitaj principoj de unueco, egaleco kaj justeco. Eblas spekti la filmon en pluraj lingvoj (dume la angla, araba, franca, hispana, persa kaj rusa) tra la internacia retejo de la Bahaa Kredo bahai.org (https://www.bahai.org/expansive-prospect) kaj pere de YouTube (https://www.youtube.com/watch?v=TtGhO-Zs2Ok).

Pro la 50-a datreveno de sia fondo aperis en Esperanto-traduko eldonita verko »Dio preterpasas« de Shoghi Effendi, la aŭtoritata historio de la unuaj cent jaroj, 1844 ĝis 1944. La preskaŭ 500-paĝa tole bindita libro mendeblas i.a. ĉe UEA (https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=4707) kaj estas alirebla kiel pdf pere de https://bel.bahai.de/literaturo/

Hofheim-Langenhain,

# UN raportas pri UK en Tanzanio

**Numero 64 – majo – junio 2023**

- UEA festis Internacian Virinan Tagon 2023.
- UEA emfazis lingvan unuecon en diverseco, okaze de la Internacia Tago de Familioj.
- Esperanto-aranĝoj ĉirkaŭas la mondon.
- Pasporta Programo.
- Esperanto antaŭeniras en Afriko: La UK de UEA okazos en Tanzanio en 2024.
- Reeĥas la efikoj de la Tago de la Gepatra Lingvo.

========= vortoj:  1400 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.  Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Komunika arĥivo: https://www.ilei.info/agado/EKO.php  por 2023 (ĝis 30.).

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.